



La plej frua pentraĵo pri la krucumo kaj resurekto de Jesuo Kristo en ilustrita manuskripto, kiu transvivis ĝis niatempe. Troviĝas en la Evangelio de Rabula el la 6a jc.

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Kiam venos la homido ...	27
Nadia Murad Basee Taha	32
La vera Civito de la kristano	34
Apostoloj kaj iliaj atributoj – 2	38
Reĝino	41
Kristana kongreso en Révfülöp	42
Ni gratulas ... kaj bondeziras	44
Informetoj	46
Forpasis Giovanni Daminelli	47
Levu vin, pordegoj	48

## Redaktoraj vortoj

La plej multaj artikoloj en la jena numero de nia gazeto temas pri la agadoj de homoj, ĉu apostoloj en frua kristanismo, ĉu nuntempaj aktivistoj. Inter nuntempaj aktivuloj troviĝas ankaŭ samideanoj kaj jubileuloj kiuj multjare laboris por nia movado diversmaniere. Pri kelkaj el ili vi povas legi sur la paĝoj 44-45 ĉi-numere.

Kiun ajn ni faris aŭ faras, iun tagon ni devas raporti antaŭ Kristo, kiel ni mastrumis niajn donacojn, niajn talentojn. Pri tio predikas József Farkas instige en la unua gazeta artikolo.

Alia artikolo prezentas la pasintjaran Nobel-pacpremiiton, Nadia Murad Basee Taha, kiu apartenas al la jezida popolgrupo kaj kiu travivis kruelan kaj perfortan tempon kun IŜIS. Bonŝance ŝi povis eskapi kaj nun laboras por helpi aliajn, kiuj spertis similajn malfacilaĵojn.

Finfine vi legos bedaŭran informon ke la prezidanto de IKUE, Giovanni Daminelli, mortis. Estas granda perdo por ni ĉiuj. Li restu en paco. ☪

# Kiam venos la homido ...

Prediko la 1an de aprilo 1984

de József FARKAS hungara protestanta pastoro (1914-1999)

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Kiam venos la homido en sia gloro kaj ĉiuj anĝeloj kune kun li, tiam li sidiĝos sur la trono de sia gloro. Kaj estos kunigitaj antaŭ li ĉiuj popoloj, kaj li disigos ilin, unujn de la aliaj, kiel paŝtisto disigas la *ŝafojn de la boko*. Kaj la ŝafojn li starigos dekstre de si, la bokojn maldekstre. Tiam la reĝo diros al tiuj je sia dekstro: Venu, benataj de mia patro, heredu la Regnon, kiu pretas por vi de la komenco de la mondo. Ĉar mi malsatis kaj vi donis al mi manĝi, mi soifis kaj vi trinkigis min, mi estis fremdulo kaj vi gastigis min, nuda kaj vi min vestis, mi malsanis kaj vi atentis pri mi, mi estis en prizono kaj vi min vizitis. Tiam respondos al li la justuloj: Sinjoro, kiam do ni vidis vin malsata kaj vin nutris, aŭ soifa kaj trinkigis? Kiam do ni vidis vin fremdulo kaj gastigis, aŭ nuda kaj vestis vin? Kiam do ni vidis vin malsana aŭ en prizono kaj venis al vi? Kaj la reĝo respondos al ili: Mi certigas vin: Kion ajn vi faris al unu el ĉi plej etaj fratoj miaj, vi faris al mi. Tiam li ankaŭ diros al tiuj je sia maldekstro: Foriru de mi, malbenitaj, en la eternan fajron, kiu pretas por la diablo kaj ties anĝeloj. Ĉar mi malsatis kaj vi ne donis al mi manĝi, mi soifis kaj vi ne trinkigis min, mi estis fremdulo kaj vi ne gastigis min, nuda kaj vi min ne vestis, malsana kaj en prizono, kaj vi ne atentis pri mi. Tiam ankaŭ ili respondos: Sinjoro, kiam ni do vidis vin malsata aŭ soifa aŭ fremdulo aŭ nuda aŭ malsana aŭ en prizono kaj ne servis vin? Tiam li respondos al ili: Mi certigas vin: Kion ajn vi ne faris al unu el ĉi plej etaj, tion vi ne faris al mi. Kaj ili foriros en eternan punon, sed la justuloj al vivo eterna.

Mateo 25,31-46 (laŭ traduko de G. Berveling)

**M**iaj karaj gefratoj, mi metas nun, unu apud la alian, kvar bibliajn tekstojn, ke ni povu vidi la malsimplecon de la juĝ-problemo. Poste ni serĉu la plenan verecon, en kiu troviĝas ankaŭ la unua versiklo, sed kiu koloriĝas per la aliaj.

La unua parto de la versikloj temas pri tio, ke nur pere de Jesuo ekzistas saviĝo.

Tion ni legas ĉe Johano (14, 6): *Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo. Neniu iras al la Patro, krom pere de mi.*

En la Agoj de la Apostoloj, en prediko eksonoras tiu ĉi sono (4, 12): *De neniu alia venas la savo; ĉar sub la ĉielo ne estas alia nomo donita al la homoj, per kiu ni saviĝu.*

Kaj kortuŝa, mallonga parto el la evangelio de Mateo (7, 21-23): *Ne ĉiu kiu diras al mi: Sinjoro, sinjoro! eniros en la Regnon de l' ĉieloj, sed kiu faras la volon de mia Patro en la ĉieloj. Tiutage multaj diros al mi: Sinjoro, sinjoro, ĉu ni ne profetadis vianome, ĉu ni ne elĵetis demonojn vianome, ĉu ni ne faris fortaĵojn multajn vianome? Sed tiam mi diros al ili malkaŝe: Neniu mi konis vin. Foriru de mi, vi kiuj faras maljustaĵojn!*

Se ni trapensas ĉiujn kune, vere ekscita problemo estas antaŭ ni. Unu-flanke tiu ĉi nureco (ekskluziveco), ke nur pere de Jesuo – ne estas alia nomo, ne estas alia vojo, ne estas alia vero, ne

estas alia ebleco saviĝi – nur pere de Jesuo – neniu povas iri al la Patro – nur pere de Li.

Aliflanke, ĉu tiu indigna surprizo atendas tiutage ĉu multajn? ĉu multajn? kiu scias? Ili iras trankvile, pensante ke mi fiere povas stari antaŭ la juĝo, ĉar mi elĵetis demonojn, mi faris fortaĵojn, mi ĉiam diris: Sinjoro, sinjoro, mia savanto, mia Kristo – kaj tiam Li respondas: neniam mi konis vin!

La tago de juĝo tiel diverse staras antaŭ ni en la Biblio. Ni serĉu la solvon en tiu ĉi streĉo, preskaŭ kontraŭdiro, kvankam kompreneble ne estas kontraŭdiro, nur ni devas bone kompreni la versiklojn.

Ĉefe konfuziga estas tio, ke ene en unu evangelio, en la evangelio de Mateo sonas tiuj du kontraŭaj versikloj. Unue, ke venu vi, benitoj de mia Patro, ĉar al vi estas preparita tiu ĉi lando, ĉar donis al mi manĝon, kiam mi estis malsata, ktp, kaj tiam ni miras: al vi? kiam? ni ne memoras pri tiu. Venu la benitoj de mia Patro, ĉar vi faris la volon de Dio. Kvankam vi ne sciis, vi faris.

Kaj due, je la alia flanko: foriru de mi, neniam mi konis vin, vi nur diris, Sinjoro, sinjoro. Al vi estis nur vidindaĵoj la mirakloj, mi ne konas vin, kaj tiel plu.

Ene en unu evangelio estas tiu ĉi streĉo: la kredantojn, la farantojn de fortaĵoj, tiujn Jesuo forigas, kaj samtempe tiujn simplajn sennomajn homojn li akceptas kiel la benitojn de sia Patro.

Miaj gefratoj, estas diversaj versikloj, sed ĉiuj versikloj parolas pri tio: ni ĉiuj devas aperi antaŭ la juĝo de Kristo.

En tiu ĉi ne estas diferenco: ni ĉiuj, kaj kredantoj kaj ne-kredantoj, kaj grandaj kredantoj kaj mallaboremaj kredantoj devas aperi antaŭ la juĝo de Kristo. Iamaniere ni devas raporti pri nia vivo.

Ĉu ni konscias, miaj gefratoj, tiun biblian bazan veron, ke ni estas komisiitoj. Kun donacoj, kun taskoj sendis nin Dio, kaj iam diros nia Mastro: do, nun vi raportu, kiel vi mastrumis per viaj talentoj, kapabloj, donacoj, tempo. Ni ĉiuj devos raporti.



*Kun donacoj, kun taskoj sendis nin Dio, kaj iam diros nia Mastro: do, nun vi raportu, kiel vi mastrumis per viaj talentoj, kapabloj, donacoj, tempo.*

---

Kaj jen estas la demando: kian mezuradon havos la kredantoj, kaj kian mezuradon havos la ne-kredantoj? Ĉar la unua kaj iom facila konkludo, kiun ni legis klare ĉe Mateo, ke la popoloj estos kolektitaj antaŭ Jesuon. Do tie ĉi oni ne parolas pri la kredantoj. La kredantoj certe havos alian mezuradon.

Do vere kiel estas tiu mezuro? Ĉu per diversaj skaloj estos mezuritaj la kredantoj kaj la ne-kredantoj? La respondo al tiu ĉi interesa teologia problemo estas, ke jes – kaj ne.

Jes, estas diferenco, estos diferenco en la mezuro, en la juĝo, kaj tamen ne estos diferenco, ĉar ne ekzistas alia,

diversa skalo, nur la ununura skalo: la amo. Ĉu vi amis la mizerulon? Helpis al tiu, kiu havis problemon? Donis panon al malsatulo? Iris viziti iun en prizono?

Ne estos alia juĝo, tiu ĉi estas la juĝo, sed ene en tiu ĉi juĝo estos diferencigado, mi parolos ankaŭ pri tio.

Sed unue ni larĝigu la rondon ekster la Biblion. Ĉar tio estas la vero, ke ne nur la Biblio instruas en diversaj versioj, ke ni devas aperi antaŭ la juĝo de Dio kaj devas raporti pri nia vivo. Tion ne nur la Biblio diras, ne nur Jesuo diras. Ekzistas tre surprizigaj kaj ekscitaj pruvoj al tiu, ke la diversaj religioj same parolas pri tio. En la juda teologio preskaŭ laŭvorte estas la sama, kiel ni legis ĉe Mateo. Kaj la egiptoj havas faman mortan libron, en kiu ni legas pri homo, kiu parolas pri tio, ke alvenas al la juĝo: Mi pacigis (laŭ alia traduko kontentigis aŭ pagis) Dion per tio, kiu estas kara al li, mi donis panon al malsatulo, akvon al soifulo, vestaĵon al nudulo, kaj tiel plu. En la morta libro de egiptoj estas la sama, kio estas en la Biblio.

Tiu frazo de Jesuo, kiun li kunportis, ne estis origina kaj nova. Ne, li diris tion, kiun antaŭ li jam aliuloj, alimaniere, aŭ preskaŭ same jam diris. Ĉu estas malbono tiu ĉi? Se oni malkovras pri tiu ĉi teksto, ke ĝinne estas la propra, aparta eldiro de Jesuo? Ke li starigis en grandan helecon tion, kio jam ekbrilis en tiu ĉi mondo? Ĉu tio estas malbono?

Ne, tute ne! Kontraŭe! Laŭ mi estas pli grandioze, ke diversaj koroj en diversaj epokoj, nacioj, religioj ekkonjektis pri tio, ke ni devas raporti pri nia vivo. Tute ne ĝenas min, kontraŭe,

ĝojigas min, ke estas universala scio, ke ni devas raporti pri nia vivo, kaj la mezurilo, per kio oni mezuros nin, estas la amo. Kiom da amo estis en ni, kiom da mizerikordo, kiom da servemo. Ĉu mi donis almenaŭ glason da akvo al soifulo?

Sed valoras atenti ankaŭ pri la diferencoj inter la tekstoj, inter la egipta teksto kaj la teksto de Jesuo. Troviĝas tio, kio estas tute sama en la du tekstoj, sed ekzistas ankaŭ grandioza diferenco inter la du tekstoj! La egipta teksto komenciĝas tiel: Mi pagis al dio per tio, kiu estas kara al li. Ĉe Jesuo ni legas pri surprizo: *Sinjoro, kiam mi helpis?*

Tie ĉi estas la unikeco de la teksto de Jesuo. En tiu ĉi diferenco mi sentas, ke la egiptoj sciis, kion ili devas fari, kio kontentigas ilian dion, kaj konscie pagis al sia dio. En la teksto de Jesuo ŝajnas, ke la homojn (sciante? ne sciante?) gvidis la animo de mizerikordo. Ili donis la akvon – ne pro tio, ĉar Dio tiel ordonas. Pro tio ili donis la akvon, ĉar la alia homo estis soifa. Estas granda diferenco. Jesuo altetaksas tion, kiam spontanee, tute nature venas la bonagado kaj ne pro tio, ĉar Dio ordonas tion. Jes, kompreneble Dio ordonas, kaj la kredantoj konscie faras tion, sed Jesuo diras, ke tio estas la ĝusta, kiam tiu agado venas el la profundeco de la homa animo.

Vi certe sentas la diferencon. Okazas, ke mi scias, kion mi devas fari, kaj mi tion faras, sed la aliulo preskaŭ ne havas rolon en tiu ĉi agado. Kaj estas tute alia, kiam ne el la konscia surfaco de mia ekzisto, sed el la profundeco venas la bonvolo al la aliulo. Ni pensu pri la parabolo de la bona samariano!

Eblas, ke ĵus mia konscia parto malhelpas min, ĉar ideologioj, dogmoj, religiaj reguloj baras min. La bona samariano spontanee, el la profundececo de sia ekzisto, helpas al la mizerulo.

Ŝajnas ke Jesuo altetaksis tiun ĉi spontanean bonvolon. Laŭ Jesuo tiu sufiĉas al la savo. Tiu ĉi necesas al la savo.

Ni reeniru al tiu grava penso: ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas diferenco inter la kredantoj kaj la ne-kredantoj ĉe la juĝo? Mi denove diras: Fine ne ekzistas, ĉar ĉiujn Dio same demandas: ĉu vi helpis? ĉu vi amis? ĉu vi faris iun sinoferon por aliuloj? Estis grava por vi la alia homo? Kion vi faris al aliulo? Kiam vi povis elpaŝi el via kompatinda egoismo, forgesi vin mem kaj vere turni vin al alia homo? Kaj al kredantoj kaj al ne-kredantoj tio estas la bazo. Sendube mi kredas tion.

Kaj tamen estas diferenco. Pri tiu ĉi diferenco mi ŝatus diri kelkajn pensojn. Ĉar ekzistas kelkaj diferencoj, kiujn mi ŝatus montri al vi, kiujn mi ekkomprenis dum miaj pensadoj.

La unua diferenco: Se ni, kredantaj homoj, vere kaj sane vivas nian kredantan vivon, tiam ni ĉiuvespere staras antaŭ la juĝo de Kristo. Ne eblas, ke ni surpriziĝu tiutage, ĉar ni devas praktiki jenon: Ĉiuvespere ni devas stari antaŭ la juĝo kaj raporti pri nia tago – Sinjoro, estas vespero, mi dankas al vi la tagon kaj mi diras al vi, kiel mi vivis, kvankam vi pli bone scias, sed mi raportas al vi. Do ni povas ĉiuvespere prepari nin, ni povas antaŭen diri, ke – Mia Sinjoro mi estas mizerulo, mi estus povinta fari bonon, sed mi ne faris, ĉar mi estis

egoista kaj maldiligenta kaj mia koro estas amara.

Eblas ĉiutage ekstari antaŭ Jesuon, kaj tio estas pliaĵo al ni kredantoj. Estas nia kristana pliaĵo, ke ni rajtas stari ĉiutage antaŭ la juĝo de Jesuo Kristo, kaj se ni faras tion, la juĝo fariĝas al pardono. Kiam ni honte staras antaŭ nia juĝisto, en Jesuo Kristo ni ricevas pardonon, kaj ricevas ankaŭ forton, ke la morgaŭan tagon ni faru alie, pli bone ol la hodiaŭan tagon.

Tie ĉi estas granda diferenco, ke la kredanta homo ĉiutage memvole ekstaras antaŭ Jesuon Kriston kaj priparolas kun li la tagon, la vivon, siajn problemojn. Tiu ĉi estas la unua diferenco.

---

“

*La ateistoj, la ne-kredemaj homoj ofte havas surprizige spontaneajn gestojn, spontaneajn bonagojn.*

---

La dua diferenco, kiu kaŭzas ĉe ni seriozan problemon estas ke ni scias pri tiuj aĵoj. Ni scias, ke la bono havas premion kaj la malbono havas punon. Ni scias ion pri la nevidebla mondo de Dio: elformiĝas rutinoj, kiuj estas danĝeraj al la kredantaj homoj: ke ni estos bonaj homoj laŭ programo, ke ni perdas nian spontaneecon.

La ateistoj, la ne-kredemaj homoj ofte havas surprizige spontaneajn

gestojn, spontaneajn bonagojn. Kelkfoje ili faras ŝokajn siniferojn. Minacas nin, kredantojn, ke ni perdas tiun ĉi ĉarman rektecon, ĉar estas la devo, ke mi kiel kredanto bonagu.

Do tie ĉi estas la dua afero: ni el tiu ĉi prudenta, scienca kredanta vivo devas reen-simpliĝi al infana vivformo. Tiam ankaŭ en ni aperos tiu ĉi spontanea respondo al mizero. Ne estas facile forgesi la dogmatikajn verojn kaj vidi nur la kompatindulon, la soifan, malfeliĉan homon. Forgesante eĉ Kriston, min mem, ĉiujn, nur ami la alian homon. Ni devas klopodi, ke ni atingu tiun infanan, simplan vivformon, ke mi helpas al aliaj.

Sed venas la tria diferenco, kaj eble tiu ĉi estas la plej grava, kiu distingas nin, ni kredantoj, de la aliuloj.

Miaj gefratoj, ĉar ni estas kredantoj, ĉe ni plilarĝiĝas la rondo. Sufiĉe larĝa estas la rondo, kiun Jesuo pentras: malsata, soifa, malsana, nuda, mallibera – sed ĉe ni tamen plilarĝiĝas la rondo. Ĉu eblas plilarĝigi tiun ĉi rondon? Jes, eblas.

Ni kristanoj, ni devas ami ne nur la malriĉulon, soifulon, prizonulon – ni devas ami ankaŭ malamikon.

Tiu estas la vero, ke estas facile doni akvon al soifulo. Kaj estas facile doni vestaĵon al nudulo, precipe kiam mi tiom multajn vestaĵojn havas, ke mi jam ne povas fermi la pordon de la ŝranko. Ĉion, kion Jesuo diras, estas facile fari.

Kiam mi komparas tion kun jeno: amu viajn malamikojn, faru bonon al viaj malamantoj, benu tiujn, kiuj vin malbenas, preĝu por tiuj, kiuj kun insulto vin atakas (Luk 6,27-28), tiam

vi sentas, ke ni parolas pri multe pli larĝa afero.

Kaj kiam ni staras antaŭ la juĝo de Kristo, li ne nur kalkulos, ke ni donis akvon, vestaĵon – li mezuros kion ni faris al niaj kontraŭuloj, al kiuj estas tiel malfacile montri nian amon; kiel malfacile estas ami ilin.

Tie ĉi mi vidas la grandan diferencon inter la juĝo de kredantoj kaj nekredantoj, kaj tie ĉi estas nia respondeceto. Ĉar ni komprenas, ke la esenco estas la amo.

Tiujn popolojn, la paganajn popolojn, kiuj ne aŭdis pri Kristo, pri la Dia amo kiu aperis en Kristo (”kiam ni malbenis Dion, kiam ni estis kontraŭuloj de Dio – tiam li donacis sian filon por ni”), tiujn, kiuj ne aŭdis pri tiu ĉi amo, Dio mezuros laŭ tio, ĉu ili donis pecon da pano al malsatulo, ĉu ili vizitis malsanulon..

Sed ĉe ni ne estas tiel simpla la afero. Ni jam aŭdis pri la amo de Dio kaj tio devigas nin fari pli.

Estas versiklo en la unua letero de Petro (4, 17), ke la juĝo komenciĝos ĉe la domo de Dio.

Malkomfortaj versikloj, malkomfortaj verecoj estas, sed ankaŭ ilin ni devas entiri en nian pensadon. La juĝo komenciĝos ĉe la domo de Dio, kaj kiu ricevis pli, de tiu oni postulos pli. Kaj ni ricevis pli. Ni ricevis ne nur la kapablon, ke ĝenerale ni resonu pri la mizerikordo. En ni kredantoj estas ne nur simpla humanismo, instinkto. En ni kristanoj estas io pli.

Kaj tio estas la plej granda diferenco ĉe la juĝo inter “ili” kaj “ni”.



# Nadia Murad Basee Taha

Kompilis el Vikipedio Bengt Olof ÅRADSSON, SE

**N**adia Murad Basee Taha naskiĝis en 1993. Ŝi estas iraka Jezidiano kaj aktivulo pri homaj rajtoj. Ŝi loĝas nuntempe en Germanio. En 2014 ŝi estis forrabita de sia hejmurbo Kocho kaj tenata de la Islama Ŝtato (IŜ aŭ IŜIS) dum tri monatoj.

En 2018, ŝi kaj Denis Mukwege ricevis la Nobel-pacpremion por “la klopodoj fini la uzadon de seksa perforto kiel armilo de milito kaj armita konflikto”. Ŝi estas la unua iraka kaj jezida gajninto de la Nobel-premio.

Murad estas la fondinto de *Nadia's Initiative* [iniciato de Nadia], organizo dediĉita por “helpi virinojn kaj infanojn viktimitajn de genocido, amasaj kruel egoj kaj homvendado, por resanigi kaj rekonstrui iliajn vivojn kaj komunumojn”.

## Frua vivo kaj kapto de IŜIS

La familianoj de Murad apartenis al la jezida etno-religia malplimulto kaj estis farmistoj. Kiam Murad estis studentino IŜ-batalantoj rondigis la vilaĝon kaj mortigis 600 homojn, inter ili ses fratojn de Nadia. La pli junajn virinojn ili prenis en sklavecon. Tio okazis en 2014. Ŝi estis sklavigita en la urbo Mosul, kaj batita, bruligita per cigaredoj kaj seksperfortita. Nadia povis finfine eskapi post kiam ŝia kaptinto forlasis la domon neŝlosante ĝin. Murad estis kondukita al rifuĝejo en Duhok, norda Irako. En februaro 2015, ŝi donis sian unuan



Nadia Murad in Washington - 2018  
/U.S. Department of State

ateston al raportistoj de la belga ĉiutaga gazeto LA LIBRE BELGIQUE dum ŝi restis en la Rwanga-tendaro. En 2015, ŝi estis unu el 1.000 virinoj kaj infanoj kiuj profitis la rifuĝintan programon de la registaro de Baden-Wuerttemberg, (Germanio), kiu iĝis ŝia nova hejmo.

## Kariero kaj aktivismo

La 16an de decembro 2015, Murad informis por la unua fojo la UN Sekurecan Konsilion pri la temo de homvendado kaj konflikto. Murad en sia rolo partoprenis tutmondajn kaj lokajn aktivajn iniciatojn por konscii pri homvendado kaj rifuĝintoj. Murad helpis al komunumoj de rifuĝintoj kaj pluvivantoj, aŭskultante atestojn de viktimoj de homvendado kaj genocido.

En septembro 2016, advokato Amal Clooney parolis antaŭ la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Narkotaĵoj kaj Krimo (UNODC) por diskuti la decidon, kiun ŝi faris en junio 2016 por reprezenti



Murad kiel kliento en jura ago kontraŭ IŜIS-komandantoj. Clooney karakterizis la genocidon, seksperforton kaj homvendadon de IŜIS kiel “burokratio de malbono en industria skalo”, priskribante ĝin kiel daŭre aktiva sklava merkato ekzistanta kaj rete, en Facebook, kaj fizike, en la Mezoriento.

En septembro 2016, Nadia Murad estis nomumita de la Unuiĝintaj Nacioj (UNODC) la unua *Bonvola ambasadoro* (angle: Goodwill Ambassador) *por la digno de postvivantoj de homvendado*.

La 3an de majo 2017, Murad renkontis Papon Francisko kaj ĉefepiskopon Gallagher en la Vatikano. Dum la

renkontiĝo ŝi “petis helpon por la jezidoj, kiuj ankoraŭ estas en kaptiteco de IŜIS, agnoskis la Vatikanan subtenon de minoritatoj, diskutis la amplekson de aŭtonoma regiono por minoritatoj en Irako, reliefigis la nunan situacion kaj defiojn, kiuj alfrontas religiajn minoritatojn en Irako kaj Sirio, precipe viktimojn kaj internajn delokitojn, same kiel enmigrintojn”.

En 2018, la direktoro Alexandria Bombach produktis dokumentan filmon, kiu nomiĝas *Sur ŝiaj ŝultroj* [angle: On Her Shoulders] pri la historio kaj aktivoj de Murad.



**J**ezidoj estas religia grupo kun la religio Jezidismo, kiu ekzistas ekskluzive inter kurdoj. Ili estas minoritata grupo inter la kurdoj, kiuj alie plimulte estas islamanoj. Jezidoj vivas en la diversaj partoj de Kurdistan, dividite inter la ŝtatoj Irako, Sirio, Turkio, kaj kelkaj malmultaj en Irano. Oni taksas ilin inter 300 000 kaj 1 000 000 anoj.

Jezidismo estas monoteisma religio, kiu havas kelkajn komunajn elementojn kun i.a. zoroastrismo, kristanismo, islamo kaj judismo. En ĝi centras ĉiopova Dio kaj ties anĝeloj, kun la ĉefanĝelo Taus-i-Melek, “Anĝelo Pavo”, kies simbolo estas pavo. Jezidoj havas malfacilan situacion en pluraj siaj loĝlandoj – ĉefe kiel ne-islamanoj inter islamanoj.

La originoj de jezidismo troviĝas en la mezorienta antaŭhistorio. Kvankam la jezidoj parolas la kurdan, ilia religio montras fortan influon de arkaika Mitraismo, de mezopotamiaj religiaj tradicioj, Kristanismo kaj fine, Islamo. Ilia ĉefa sankta ejo estas en Laliŝ, nordoriente de Mosulo.

La kulturaj praktikoj de jezidoj estas observeble kurdaj, kaj preskaŭ ĉiuj parolas la nordan kurdan lingvon, kun la escepto de la vilaĝoj Bashiqa kaj Bahazane en norda Irako, kie la araba estas parolata. La norda kurda estas la lingvo de preskaŭ ĉiuj buŝe diritaj religiaj tradicioj de la jezidoj. La religio de la jezidoj estas tre sinkretisma: Sufia influo povas esti vidata en la religia vortprovizo, sed multe de la mitologio estas ne-islama. Iliaj pensoj pri la formiĝo de la mondo certe havas multajn oftajn punktojn kun la malnovpersaj religioj. La origino de la jezida religio nun estas kutime vidita de akademiuloj kiel kompleksa procezo de sinkretismo, per kio la kredsystemo kaj praktikoj de loka kredo havis profundan influon sur la religieco de anoj de sufia ordeno en la kurdaj montoj, kaj ĝi deviis de islamaj normoj relative baldaŭ post la morto de la fondinto Ŝejko Adi ibn Musĝfir, kiu ekloĝis en la valo de Laliŝ en la frua 12-a jarcento. Li mortis en 1162, kaj lia tombo ĉe Laliŝ estas la fokuso de jezida pilgrimado.

/Ĉerpoj el Vikipedio

# La vera Civito de la kristano

## kaj aliaj paraboloj el LA PAŜTISTO DE HERMAS

### el libro tradukata – tempe de la nova testamento

El la Greka, tradukita de Gerrit BERVELING, NL

LA PAŜTISTO DE HERMAS estas kristana literatura verko verkita de certa Hermas, la frato de Pio, kiun ni konas kiel unu el la plej fruaj “papoĵ” de Romo (ĉ. 142-155 p.Kr.). La verko konsistas el kvin vizioj, dek du ordonoj kaj dek paraboloj. Alegorie ĝi atentigas la Eklezion, vokante la fidelulojn penti pro pekoj, kiuj damaĝis la Eklezion.

La libro estis origine verkita en Romo, en la greka lingvo, ĉar tiuepoke la Eklezio estis ĉefe greklingva; la latina lingvo ekuziĝis en la okcidenta eklezio unue en Nord-Afriko, kie Tertuliano estis ĝia unua grava latinlingva aŭtoro. La Biblio en kristanismo origine oni legis greke, kune kun ĝiaj duakanonaĵoj; la unua provo je latina biblio-tradukado estas konata de fakuloj kiel “vetus latina = malnova latina”, sufiĉe kruda lingve; kio postrestas estas nuraj fragmentoj. La unua serioza Latina Biblio-traduko venis kun Hieronimo (347-420), kiu en Israelo lernis la hebrean lingvon por sia biblio-traduklaboro. Lia traduko poste nomiĝis LA VULGATO (= la en la popolo disvastigita). La gota traduko de Vulfilo (ĉ. 311-383) estas la unua nacilingva traduko en okcidento; ĝi postrestas tre nekomplete.

Sube vi trovas tradukon de kelkaj paraboloj de HERMAS el la greka fare de Gerrit BERVELING. /Red

### Unua parabolo

*La vera Civito de la kristano*

**1[50]:1** Li diris al mi:

Vi scias – li diris –, ke vi sklavoĵ de

Dio loĝas en fremda lando, ĉar via civito<sup>1</sup> estas longe for de ĉi tiu civito. Se vi do scias la urbon – li diris –, en kiu vi loĝos, kial do ĉi tie vi preparas kampojn kaj multekostajn aranĝojn kaj konstruaĵojn kaj loĝejojn, kiuj ja estas superfluaĵ? 2 Kiu tiajn aferojn preparas en ĉi tiu urbo, ne estas returniĝanta al la propra urbo. 3 Ho stulta kaj dumensa kaj mizera homo, ĉu vi ne konscias, ke ĉio ĉi estas

<sup>1</sup> Civito kaj urbo estas la sama vorto en la originalo; por memori pri la verko Civito de Dio de Aŭgustino mi ĉi tie foje uzas la vorton civito.



Paŝtisto de Hermas, aŭ la *Bona Paŝtisto*, 3-a jarcento en Katakomboj de Romo. /Wikipedia

aliula kaj sub estrado aliula? Ĉar diros la Sinjoro de tiu ĉi urbo: Mi ne volas, ke vi loĝas en mia urbo, do vi foriru el ĉi urbo, car miajn leĝojn vi ne sekvas. 4 Vi do, kiu havas kampojn kaj loĝejojn kaj multe da aliaj aferoj, se li elĵetas vin, kion vi faros pri via kampo kaj via domo kaj ĉio cetera, kion vi preparis por vi mem? Prave ja diros la Sinjoro de tiu ĉi lando: Aŭ vi sekvu miajn leĝojn, aŭ foriru el mia lando. 5 Kion vi faros, vi kiu havas leĝon en via propra urbo? Pro viaj kampoj kaj la cetera posedaĵo, ĉu entute vi neos vian propran leĝon kaj promenos laŭ la leĝo de tiu ĉi urbo? Atentu, ke ne estas utile nei vian propran leĝon, ĉar se vi deziras returniĝi al via urbo, vi ne estos akceptita, se la leĝon de via urbo vi neis, kaj tiam vi estos ekskludita de ĝi. 6 Do atentu vi; ĉar loĝante en fremda lando, vi nenion preparas por vi mem, krom kiom provizore sufiĉas por vi, kaj vi estu preta, kiam la mastro de tiu lando deziras elĵeti vin el tiu urbo, ĉar lian leĝon vi kontraŭas, ke vi foriru el lia urbo kaj reiru al via propra urbo, kaj ĝoje uzu vian propran leĝon, sen ajna perforto.

7 Atentu vi do, ke vi estas sklavoj de Dio kaj havu Lin en via koro! Faru la agojn de Dio, memorante Liajn ordonojn kaj la promesojn, kiujn Li donis, kaj fidu je Li, ke Li plenumos ilin, kiam Liajn regulojn vi sekvas. 8 Anstataŭ kampojn aĉetu vi do animojn prematajn, laŭ ĉies ebleco, kaj vizitu vidvinojn kaj orfojn kaj tiujn ne neglektu, kaj viajn riĉaĵojn kaj ĉiujn viajn preparojn elspezu pri tiaspecaj kampoj kaj domoj, kiujn vi ricevas de Dio.<sup>1</sup> 9 Kun tiu celo ja riĉigis

<sup>1</sup> Legu tiel ke «kiujn vi ricevas de Dio» rilatu al

vin la Mastro, ke tiujn servadojn vi faru por Li; estas ja multe pli bone akiri tiajn kampojn kaj posedaĵojn kaj domojn, kiujn vi <re>trovos en via urbo, kiam tiun vi vizitos. 10 Tiu riĉeco estas bela kaj sankta, ne donas triston aŭ timon, sed ja ĝojon. Sed la riĉecon de la paganoj vi ne praktiku; ĝi ja ne konvenas al la sklavoj de Dio. 11 Sed praktiku la propran riĉecon, pri kiu vi povas ĝoji; kaj ne falsigu ĝin, nek ekkaptu aŭ deziru aliulan posedaĵon; ĉar estas malbone deziri ion aliulan. Faru vian propran laboron, kaj vi saviĝos.

## Dua parabolo

### *La ulmo kaj la vito*

**1[51]:** 1 Mi promenadis en la kampo kaj tie mi rimarkis ulmon kaj viton, kaj dum mi primiris ilin kaj rigardis pri iliaj fruktoj, aperis al mi la paŝtisto, kaj li diris al mi:

«riĉaĵoj»; la frazo estas iom nelerte vortumita.



Francesco Melzi 1517-20  
/ "The elm and the vine" Wikipedia

Kion vi pripensas pri la ulmo kaj la vito?

Mi pripensas, <sinjoro> – mi diris –, ke ili estas mirinde adaptitaj unu al la alia.

2 Tiuj du arbospecoj – li diris – estas parabolo pri la sklavoj de Dio.

Tiun parabolon – mi diris – volonte mi ekscius pri tiuj arboj, kiujn vi menciis.

Ĉu vi vidas – li diris – la ulmon kaj la viton?

Mi vidas, sinjoro.

3 La vito – li diris – portas fruktojn, sed la ulmo estas arbo sen fruktoj; sed se tiu vito ne suprengrimis sur la ulmon, ĝi ne povus porti multajn fruktojn, etendita sur la grundo; sed la fruktoj, kiujn ĝi portas, estus putrintaj ĉar ĝi ne pendiĝus je la ulmo. Sed kiam la vito estas fiksita sur la ulmon, ĝi portas fruktojn por si mem kaj por la ulmo. 4 Vi vidas do, ke ankaŭ la ulmo portas multajn fruktojn, ne malpli ol la vito, sed eĉ pli.

Kiel, sinjoro – mi diris – eĉ pli?

Ĉar – li diris – la vito pendanta je la ulmo donas bonajn kaj belajn fruktojn, sed etendita surgrunde ĝi donas putrajn kaj malmultajn. Tiu ĉi parabolo do temas pri la sklavoj de Dio, same pri la malriĉaj kiel la riĉaj.

5 Kiel do, sinjoro? – mi diris –; instru min.

Aŭskultu – li diris –: La riĉulo havas multajn posedaĵojn, sed koncerne la Sinjoron li estas malriĉa, ĉar lia riĉeco distras lin, kaj ege malmulte li preĝas aŭ laŭdas la Sinjoron, kaj kion li preĝas aŭ laŭdas, estas ege eta, malsignifa kaj sen forto tie supre. Kiam do la riĉulo iras al la malriĉulo kaj havigas al li la necesaĵojn, fidante, ke pro kion li faras

al la malriĉulo, antaŭ Dio li havos sian rekompencon, ĉar la malriĉulo estas riĉa en preĝado kaj laŭdado, kaj havas multan forton lia preĝado antaŭ Dio; la riĉulo do havigas al la malriĉulo ĉion senhezite. 6 Kaj la malriĉulo, subtenate de la riĉulo, porpetas por li, dankante al Dio pro tiu, kiu donis tion al li. Kaj la alia des pli strebas por <helpi> la malriĉulon, por ke neniam li havu mankon en la vivo; ĉar li scias, ke la preĝo de la malriĉulo estas bonvena kaj riĉa antaŭ Dio. 7 Ambaŭ faras sian laboron: la malriĉulo faras la preĝon, en kio li estas riĉa [kion li ricevis de la Sinjoro]; kaj la riĉulo, same, la riĉon, kiun li ricevis de la Sinjoro, senhezite havigas al la malriĉulo. Kaj tio estas granda laboro kaj bonvena ĉe Dio, ĉar li konsciiĝis pri sia riĉo kaj agis por la malriĉulo el la bonfaroj de la Sinjoro, kaj ĝuste plenumis la servadon de la Sinjoro.

8 Laŭ la homoj do la ulmo ŝajnas ne doni fruktojn, kaj ili ne scias nek perceptas, ke kiam sekeco estiĝas, la ulmo, kiu gardas la akvon, nutras la viton, kaj ĉar la vito seninterrompe havas akvon, ĝi povas doni duoblajn fruktojn, same por si mem kaj por la ulmo. Tiel same la malriĉuloj, preĝante al la Sinjoro pro la riĉuloj, plenigas ilian riĉon, kaj aliflanke la riĉuloj, havigante al la malriĉuloj kion ili bezonas, plenigas iliajn animojn. 9 Ambaŭ tiel partoprenas en justa laboro. Kiu tion faras, tiu ne estos forlasita de Dio, sed li estos skribita en la libron de la vivantoj.

10 Feliĉaj la riĉuloj, kiuj komprenas, ke sian riĉon ili ricevis de la Sinjoro; kiu tion komprenas, tiu per ĝi ankaŭ povos servadi ion.

## Tria parabolo

*La nuna mondo, vintro por la justuloj*

**1[52]:**1 Li montris al mi multajn arbojn sen folioj, sed ili aperis al mi, se tiel diri, velkintaj; ĉar ili ĉiuj estis similaj. Li diris al mi:

Ĉu vi vidas tiujn arbojn?

Mi vidas, sinjoro – mi diris al li –, kaj ke ili ĉiuj estas similaj kaj sekaj.

Li respondis al mi:

La arboj, kiujn vi vidas, reprezentas la loĝantojn de ĉi mondo.

2 Kial, sinjoro – mi diris –, ili do estas tiel similaj kaj velkintaj?

Ĉar – li diris –, nek la justuloj nek la pekuloj klare vidiĝas en ĉi mondo, sed estas similaj; ĉar tiu ĉi mondo por la justuloj estas vintro, kaj ili ne estas videblaj, ĉar ili loĝas inter la pekuloj. 3 Ĉar same kiel vintre la arboj, kiuj perdis siajn foliojn, estas similaj, kaj same kiel ne estas videble, kiuj estas velkintaj aŭ kiuj ankoraŭ vivas, tiel same en ĉi mondo ne estas videble, kiuj estas justuloj aŭ pekuloj, sed ĉiuj estas similaj.

## Kvara parabolo

*La mondo burĝonanta, somero*

**1[53]:**1 Li montris al mi multajn aliajn arbojn, kelkaj burĝonis, aliaj elsekiĝis, kaj li diris al mi:

Ĉu vi vidas – li diris – tiujn arbojn?

Tiujn, sinjoro – mi diris – mi vidas, kaj kelkaj estas verdaj, aliaj sekaj.

2 Tiuj verdaj arboj – li diris – reprezentas la homojn, kiuj loĝos en la venonta mondo; ĉar la venonta mondo

estas la somero<sup>1</sup> por la justuloj, sed por la pekuloj vintro. Kiam do ekbrilos la kompatato de la Sinjoro, tiam klare aperos tiuj, kiuj estas sklavoj de Dio, ja ĉiuj klare videblos. 3 Ĉar kiel en la somero videbliĝas la fruktoj de ĉiu unuopa arbo, kaj estas konstatite, kiaj ili estas, tiel same la fruktoj de la justuloj estos klare videblaj, kaj koniĝos ĉiuj, kiuj bone fruktas en tiu mondo.

4 Sed la paganoj kaj la pekuloj, kiujn vi vidis kiel sekajn arbojn, montriĝos sekaj kaj senfruktaj en tiu ĉi mondo, kaj kiel lignaĵo ili estos forbruligitaj kaj ili estos klaraj, ĉar ilia agado montriĝis malbona en ilia vivo. Kaj la pekuloj estos bruligitaj, ĉar ili pekis kaj ne pentis; la paganoj estos bruligitaj, ĉar sian Kreinton ili ne rekonis.

5 Viaflanke do vi estu fruktodona, por ke en la somero koniĝu la frukto. Retenu vin tamen de la multa agado, kaj atentu ke neniam vi peku. Ĉar kiuj multe agadas, ankaŭ multe pekas kaj distritaj per sia agado, ili neniel estas plu sklavoj de Dio. 6 Kiel ja – li diris al mi – tia homo povas peti ion de la Sinjoro kaj ricevi ĝin, se li ne estas sklavoj de Dio? Ĉar kiuj estas sklavoj al Li, tiuj ricevos kion ili petis. Sed kiuj ne estas sklavoj al la Sinjoro, tiuj ne ricevos. 7 Sed se iu faras nur unu agon, li ankaŭ povas esti sklavoj al la Sinjoro. Ĉar lia menso ne koruptiĝas for de la Sinjoro, sed li estos sklavoj al Li, ĉar menson puran li havas. 8 Se tion vi do faros, vi povos esti fruktodona por la venonta mondo; kaj kiu tion faras, tiu estos fruktodona.

☪

<sup>1</sup> La sama vorto ankaŭ signifas *rikolto*.

# Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

Dua parto

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

## Andreo

**A**ndreo devenis el Galileo kaj estis la frato de Simon Petro. Li fariĝis disĉiplo de Johano la Baptisto, kaj kiam Johano montris Jesuon kiel “La ŝafido de Dio”, Andreo tuj komencis sekvi Jesuon. Li kunportis la fraton, Petron, al Jesuo.

Interese, ke Andreo mem volis esti disĉiplo de Jesuo – sed Petro fariĝis disĉiplo nur pro la admono de Jesuo. La du fratoj forlasis la vivon de fiŝistoj kaj akceptis la rolon de disĉiplo apud Jesuo.

En la evangelioj Andreo aperas kiel homama disĉiplo sen antaŭjuĝoj, kun prudenta pensmaniero, kiu estas malfermita kaj agema.

Post la resurekto de Jesuo li unue plenumis sian Dian elvokon en Malgrandazio, sed ne je la marbordaj lokoj, kie Paŭlo laboris, Andreo agadis sude de la Nigra maro, en Armenio kaj Kurdistano. Laŭdas la senfinan meriton kaj homan grandecon de Andreo, ke unue en la mondo en Armenio estiĝis la kristanismo ŝtata religio. Oni pensas, ke li povis danki la sukceson de sia konvertiga laboro, ke li ne volis perforte, agresive ekstermi la ekzistantan kulturon de la popoloj – li respektis la lokajn tradiciojn.

Andreon ankaŭ la skitoj permesis eniri en siajn internajn rondojn, post li

transiris Danubon. La leĝoj kaj la etiko de la skitoj estis legendaj, ili havis seriozan spiritualan estintecon. Al la kontribuo de Andreo nur tiu de Filipo




Romo, Baziliko Sankta Johano de Laterana  
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

alproksimiĝis, pro tio ili du estas nomitaj kiel “la du skitaj konvertigantoj”.

Post la lando de la skitoj kaj Trakio

Andreo iris al Grekio, kie li diskutadis pri la kredo kun la reganto. Oni prizonis kaj poste en jaro 60 oni krucumigis lin en Patraso.



18a jarcento, Ukrainio

La legendoj parolas pri kruco, kiu havis X-formon, pro tio oni nomas ĝin Andreo-kruco, kaj pro tio la Andreo-kruco estas lia atributo.



Jesuskirken, Kopenhago  
fino de 19a jarcento

## Jakobo (la pli aĝa)

Jakobo estis la filo de Zebedeo kaj Salome, frato de Johano la evangeliisto. Pro tio oni nomas lin “la pli aĝa”, por ke oni diferencigu lin de la alia Jakobo, disĉiplo, kiu estis la filo de Alfeo.

Kun sia frato Johano, li estis disĉiplo de Johano la Baptisto kiu ilin gvidis al Jesuo. Jakobo estis inter la unuaj de la disĉiploj de Jesuo. Sankta Marko nomas ilin (la fratojn, do Jakobon kaj Johanon) *Boanerges*, tio estas, Filoj de tondro.



Baziliko Sankta Johano de Laterana  
en Romo  
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

El la Agoj de la Apostoloj ni scias, ke Herodo Agrippa ekzekutigis lin per glavo.

Tio signifas, ke ne estas kredebla tiu mezepoka legendo, laŭ kiu Jakobo misiis en Hispanio. Tamen ekde la 9a jarcento oni kultas la tombon de Jakobo en Santiago de Compostela.

Do kiamaniere la korpo de Jakobo la pli aĝa venis al Hispanio? Laŭ la mito, post la martira morto, pro dekreto de la

reĝo oni ne rajtis entombigi lin, kaj pro tio la disĉiploj ŝtelis la korpon kaj metis ĝin en marmoran ĉerkon kaj kaŝis ĝin sur ŝipon. Sed la ŝipo liberiĝis kaj drivis al la maro. Tie ĝi ĵetiĝadis, ĝis ĝi atingis la bordon je Iria Flavia, kie oni entombigis la korpon. Neniu sciis pri tio, se en la 9a jarcento stelo ne signus la lokon.

La nomo de Sankta Jakobo hispane estas Sant Iago, kaj la “kampo de la stelo” latine estas *campus stellae*, pro tio oni nomas la urbon Santiago de Compostela.

Jakobo la aĝa estas la sanktulo de Hispanio kaj de la pilgrimantoj.

Pro tio estas lia atributo la pilgrimbastono kaj la konko.

(Daŭrigota.)





Julia SIGMOND, RO/IT

**C**iuuj homoj pensas pri diversaj aferoj, koncerne la vorton reĝino. Neniam mi sonĝis, ke mi estas reĝino, nek mi revis, ke estus bonega vivi kiel reĝino! Neniam mi volintus esti reĝino.

(Mia dek jara baptofilo respondis tiele, kiam oni pridemandis lin “kio ci dezirus esti kiel plenkreskulo”:

– Mi ne scias ankoraŭ kio mi estos, sed mi scias, kio mi ne estos !

– Kio ci ne estos ?

– Mi ne estos profesoro de matematiko, nek kamenpurigisto. Li iĝis dentisto.)

Se mi aŭdas la vorton reĝino, certe unue mi pensas pri la nuntempa angla reĝino, pri la 92 jara maljunulino, kiu ankoraŭ kapablas reĝi super sia lando. Laŭ “mislantaj” opinioj, ŝi ne volas transdoni la kronon al la tronheredonta filo, ĉar laŭ ŝi li ne estus bona reĝo.

Koncerne la vorton, la plej ekscita estas la vivo de la abelreĝino. Preskaŭ nekredbla estas tiu organizita disciplino, kiu regas en abelujo. Kie ĉiu abeleto konas sian rolon kaj diligente plenumas sian taskon. Nur admiri eblas ilin kaj per sincera dankemo pensi pri ili, kiam ni manĝas buter-miel-panon. Tamen, sincere konfesante, ankaŭ abelreĝino mi ne dezirus esti.

Plej forte mi kompatas la “belec-reĝinojn”! Ĵus mi legis, ke multaj junulinoj, ĉe naciaj kaj internaciaj konkursoj de beleco, post ilia elektado – memmortigis. Ili ne povis elteni anime, nek fizike, tiun ŝarĝitan vivmanieron, kiun

oni postulas de unu “belec-reĝino”.

Supozeble ĉiuj scias, ke eĉ la muzikinstrumentoj havas reĝinojn. En la muzika mondo ĉiuj akceptas, ke la orgeno estas la reĝino de la instrumentoj.

Koncerne la vorton reĝino, certe mi havas la plej belan memoraĵon, kiam mi ludis por la unua fojo orgenon. En la jaro 1947 mi loĝis en la Unitaria Internejo por knabinoj en Kluĵo (Transilvanio).

Printempe okazis iu festo – eble estis la tago de la patrinoj – en la unitaria preĝejo. En la programo estis interalie violonkoncerto, prezentita de juna violonstudento kaj oni serĉis akompaniston. Oni petis mian kunlaboron, sed mi rifuzis, ĉar mi estis fortepianisto kaj neniam mi ludis orgenon. Oni konvinkis min, ke mi certe kapablos ludi. Plurfoje ni havis provon, ĝis mi perdis la timon. Poste alvenis la festotago kaj tiel okazis, ke belan printempan dimanĉon en 1947, la unuan fojon mi ludis la orgenon antaŭ publiko. Tiam mi estis 18 jara. Dum jardekoj multfoje mi ludis ĉi tiun orgenon. Mirinde sonas ĉi tiu instrumento! Ja la orgeno havas animon. Kiam eksonas la plurcentjaraj melodioj de la psalmoj, ni povas aŭskulti la kantadon de ĉi tiu animo.

La orgeno estas vera reĝino.

Feliĉe mi rememoras pri tiu belega printempa dimanĉo, kiam mi sonorigis tiun sanktan instrumenton. ☞

# Kristana Kongreso 2019 en Révfülöp

## Ekskursprogramero

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

**P**roksime al Révfülöp troviĝas Tapolca, kie mi volonte montros al vi interesan naturan vidindaĵon: groton kun lago!

En 1903 oni trovis la groton, kiam oni fosis puton – kaj malkovris, ke la grot-sistemo entute estas ĉirkaŭ 8700 metroj longa kaj situas 16 metrojn sub la tero. Kiam oni finis la baŭksitominadon en la proksimeco, la subtera akvo parte reen-plenigis la grotojn.

Eblas viziti 250 m longan parton – el kiuj 180 m oni per boatoj povas viziti.

73 ŝtupoj iras suben, la temperaturo ĉiam estas ĉirkaŭ 20 gradoj kaj la relativa humideco estas 90 %.

Vi nepre devas mem travivi tiun ekskurson!

(Aliĝilon al la kongreso vi trovas en la numero 5/2018 de Dia Regno aŭ surrete ĉe <http://keli.chez.com/>.  
Aliajn detalojn en numero 1/2019.)



# Kristana Kongreso 2019 en Révfülöp

Listo de aliĝantoj ĝis la 25a de marto 2019

- |                                |          |                          |          |
|--------------------------------|----------|--------------------------|----------|
| 1. Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS       | Hungario | 15. Štěpán POSPÍŠIL      | Ĉeĥio    |
| 2. Bengt Olof ÅRADSSON         | Svedio   | 16. Šimon POSPÍŠIL       | Ĉeĥio    |
| 3. André ÅRADSSON              | Hungario | 17. Mária LÁSZLÓ         | Hungario |
| 4. Pavel POLNICKÝ              | Ĉeĥio    | 18. Terézia Ildikó SCURT | Rumanio  |
| 5. Samuel GAILLARD             | Francio  | 19. Endel OJASILD        | Estonio  |
| 6. Philippe COUSSON            | Francio  | 20. Joonatan OJASILD     | Estonio  |
| 7. Margit-Judit OLAH           | Rumanio  | 21. Hanna CAYZAC         | Francio  |
| 8. Eugenia-Ecaterina POPOVICIU | Rumanio  | 22. Norbert SÜDLAND      | Germanio |
| 9. Antal FARKAS                | Rumanio  | 23. Agneta JÄRLSTRÖM     | Svedio   |
| 10. Szabolcs BIRTA             | Rumanio  | 24. Margareta ANDERSSON  | Svedio   |
| 11. Sieglinde STAMM            | Aŭstrio  | 25. Antal PESTI          | Hungario |
| 12. Gabriella STIER            | Rumanio  | 26. Teresa POMORSKA      | Pollando |
| 13. Oldřich Arnost FISCHER     | Ĉeĥio    | 27. Mirosława KUBICKA    | Pollando |
| 14. Václav POSPÍŠIL            | Ĉeĥio    |                          |          |

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

### 1. aprilo

Ĉiela Patro, malfermu miajn okulojn por la mirindaĵoj de Via boneco. Ili ja fariĝis jam tute kutimaj por mi. Mi tutkore laŭdu Vin pro ili kaj mi ĉiutage denove miru pri ili.




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

## Bernhard Eichkorn – 85 jara

**L**a 22an de marto, pastro **BERNHARD LEICHKORN** (DE) 85-jariĝis. Li daŭre aktivas por IKUE. Li plu prilaboras sian kristanan fakvortaron Germana-Esperanto kaj lastatempe presigis sian tradukon de la traktajo “La Patronia“ de Benedikto la 16-a (kiun li donacis ankaŭ al la 25 partoprenantoj de la Bibliaj Tagoj en Majenco antaŭ 3 semajnoj).

Jen kelkaj ligiloj:

1. Pri Bernhard Eichkorn en Vikipedio:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Bernhard\\_Eichkorn](https://eo.wikipedia.org/wiki/Bernhard_Eichkorn)
2. Retejo de Bernhard Eichkorn:  
<http://bernhardeichkorn.de/>
3. Kristana Glosaro Germana-Esperanto:  
<http://bernhardeichkorn.de/kristana-fak-vortaro/>
4. Joseph Ratzinger (Benedikto la 16-a): La Patronia. Meditoj pri la Preĝo de la Sinjoro  
<http://bernhardeichkorn.de/ratzinger-patronia/>



B. Eichkorn dum la ekumena kongreso en Vroclavo 2009.  
Fotis Bengt O Åradsson

Amike  
Ulrich

## Nia jubileulo Josef Pokorný – 99 jara !!

**L**a 1an de februaro ĝisvivis 99 jarojn plej aĝa ĉeĥa keliano frato **JOSEF POKORNÝ**. Li vivas en la Domo de pensiuloj en urbeto Hořice. Ni deziras al li precipe Dian benon en ĉiuj liaj pliaj tagoj.

Amike  
Pavel Polnický

## ... kaj bondeziras

### Wil van Ganswijk – 90 jara

**L**a 4an de januaro 2019 estis festotago por sinjorino **WIL VAN GANSWIJK** (NL). Ŝi fariĝis 90 jara kaj invitis multajn geamikojn kaj konatulojn al restoracio. Pluraj el vi certe rememoras ke ŝi ofte venis al niaj kongresoj kun kelkaj Eo-gelernantoj. Ŝi daŭre aktivis en la Groninga Esperanto-klubo kaj instruas al unuopaj plenkreskuloj. En 1998 ŝi komencis la unuan retan kurson por nederlandanoj. Wil estas ankaŭ membro de Esperanto Nederland, NGGE (la nederlandaj E-geinstruistoj) kaj ILEI (Internacia).

Jen kelkaj ligiloj por plia informo:

1. En vikipedio:  
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Wil\\_van\\_Ganswijk](https://eo.wikipedia.org/wiki/Wil_van_Ganswijk)
2. Persona retpaĝo:  
<http://www.xs4all.nl/~wvganswk/>
3. Pri la kurso:  
<https://wvganswk.home.xs4all.nl/esp.htm>



W. v Ganswijk dum la kongreso en Zöblitz 2012.


Fotis Václav Pospíšil

Amike  
Els

### Gerrit Berveling – 75 jara

**I**nter la jubilantoj, pri kiuj la redakcio eksciis, troviĝas ankaŭ nia ofta kontribuanto **Gerrit Berveling** (NL), kiu la 1an de aprilo festis siajn 75 jarojn. Ni ofte legas tradukon de li en Dia Regno kaj ofte liaj tradukoj de la novtestamentaj evangelioj kaj leteroj estas uzataj. Ĉion bonan!

Amike  
Bengt Olof Åradsson



G. Berveling en Jubilea Festo de la antverpena grupo, 2007.  
Fotis Ziko van Dijk / Vikipedio CC BY-SA 3.0

# informejoj

## Korektendaĵoj en Dia Regno 1/2019

Post la presado de la pasinta numero de Dia Regno, mi estis atentigita pri kelkaj lingvaj eraroj kaj pri manko de fonto. Mi dankas por la atentigoj.

### Lingve:

- Sub la bildo sur la fronta paĝo devus esti skribita “Ĝi estas komuna en preskaŭ ĉiuj kristanaj eklezioj”, ĉar la bapton oni ne povas dividi! En la germana ja eblas ekz.: «Seine Meinung wurde geteilt von vielen» en la senco: Multaj havis la saman opinion kiel li.
- En la artikolo sur la paĝoj 6-7 “signifi” estis duloke erare uzata sen akuzativo. Devas ekz. esti “kiu signifas delegiton”.
- Preserare ni skribis (p. 7) la novtestamentan libron malbone. Devas esti: “Ni legas en la Agoj de la Apostoloj”.

### Manko de ĝusta fontindiko:

En Dia Regno 1/2019 sur paĝo 19 troviĝas 4 preĝetoj. Du el ili (la 1a kaj la 4a) estas laŭvortaj reskriboj de preĝoj el la preĝlibreto *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus. La aliaj du portas stilan similecon kaj parte ankaŭ enhavan. Bedaŭrinde nenie estas ia indiko al la originala verkisto de la preĝoj aŭ kiel fonto de inspiro.

La redaktoro bedaŭras kio okazis kaj petas kontribuantojn, ke ili, samtempe kun ebla publikigota materialo, ankaŭ indiku fontojn kaj eblajn kopirajtojn. Tiel ni povas eviti konfuzojn kaj rompojn de reguloj.



## Elizabeth MILLER

Longjara KELI-membro Elizabeth MILLER forpasis en februaro en Brooklyn, Novjorko. Dum la lastaj tri jaroj ŝi suferis pro malboniĝinta sanstato kaj devis forlasi sian ŝatatan apartamenton en Brooklyn por vivi en fleghejmo. Aparte pri Esperanto, ŝi tre interesiĝis pri la japanaj lingvo kaj kulturo kaj pri lingvoj ĝenerale. Antaŭ ŝia malsano, ŝi posedis kolekton de pli ol 2 400 libroj, inkluzive de libroj en la japana, korea, hispana, franca, itala kaj Esperanto. La tutan kolekton ŝi donacis por senpaga disdono al la studentoj de Brooklyn-Kolegio ĉe la Urba Universitato de Novjorko. Foto de la libroj, sub granda ŝildo kun la surskribo “Elizabeth Miller Libro Kolekto”, aperis en la ĵurnalo de la kolegio. Elizabeth ankaŭ estis subtenanto de la Usona Biblio-Societo kaj de organizoj batalantaj por homaj rajtoj.

Jerald VEIT

# Levu vin, pordegoj

## ÖFFNET EURE TORE

Kp. Psa 24,7-10 kaj Psa 47



1.-2. «Le-vu vin, por - de-goj, por-doj, le-vu vin.



Ve-nas por en - i - ri Li, la Reĝ' de l' glor'» -



«Di-ru! Ki - u es-tas ti - u Reĝ' de l' glor'?» -



1. «For - ta Di, po - ten - ca. Di, la E - ter - nul'»

2. «Di' de l' le - gi - a - roj, Di - o Ce - ba - ot.»

*refreno:*



Ha-le - lu - ja. Ha-le - lu - ja. Ha - le-lu - ja.

3. Kristo supreniras ĉe trumpeta son',  
sidas kun la Patro sur la sankta tron'.  
Kiu sur la kruco pendis en mizer',  
regas nun en gloro, Reĝ' de l' tuta ter'.  
Haleluja. Haleluja. Haleluja.

4. Ĝoju, vi, popoloj, gaju, ter' kaj mar',  
laŭdu kaj man-plaŭdu, vi, ho sanktular'.  
Kiu en staltrog' por ni povrigis sin,  
li en sia gloro same amas nin.  
Haleluja. Haleluja. Haleluja.

*el Psa 24*

7 Levu, pordegoj, viajn kapojn; Kaj leviĝu, pordoj antikvaj, Por ke eniru la Reĝo de gloro.

8 Kiu estas tiu Reĝo de gloro? La Eternulo forta kaj potenca, La Eternulo, la potenculo de milito.

9 Levu, pordegoj, viajn kapojn; Kaj leviĝu, pordoj antikvaj, Por ke eniru la Reĝo de gloro.

10 Kiu estas tiu Reĝo de gloro? La Eternulo Cebaot, Li estas la Reĝo de gloro.

*el Psa 47*

2 Ĉiuj popoloj, plaŭdu per la manoj ...

6 Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo, la Eternulo ĉe trumpetado

8 Ĉar Dio estas la Reĝo de la tuta tero: Kantu edifan kanton!

9 Dio reĝas super la popoloj; Dio sidas sur Sia sankta trono.

ÖFFNET EURE TORE, FÜRSTEN, ÖFFNET SIE • GL (Speyer) 870, nGL (Speyer) 800 • nGL (Freiburg kaj Rottenburg-Stuttgart) 810 • 4a strofo: Salve Regina 140.3 • M (Öffnet eure Tore): Trier 1846 • germana T: laŭ Christoph Bernhard Verspoell 1810 • E: Albrecht Kronenberger 2016-05-05, je la Ĉielira Festo; lasta prilaboro: Kloster Kirchberg 2016-05-10